

El la enhavo:

85-a UK Tel-Avivo

Salutoj de gravuloj

Kongresa agado

Kongresa rezolucio

KELI-kongreso en J. Lázně

OSIEK en Strážnice 2001

Paroliga kurso Dobřichovice

Novaj honoraj membroj de UEA

Premio Deguči kaj subvencio Cigno

4
2000

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**85-a UK TEL - AVIVO -
EL LA KONGRESA
KALEJDOSKOPO**

☆ Starto ☆

organo de Ĉĥa Esperanto-Asocio. 6-foje jare. Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

rete: starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto

ĈEA: cea@tnet.cz, www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 200 Kč, B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 490 Kč komencantoj, 450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa, ekzamena

Asocia adreso: Ĉĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047 (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126 (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj)

Sekretariino: Květa Krajčková, Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1 (kontado, membrobazo)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencoj, seminarioj)

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havřířov, tel. 069/6815253 (EK, kulturo)

Komitatano: Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio, ĉefdelegito de UEA)

Kontrolgrupo de ĈEA: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

Ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, elektronika poŝto:

vlada_hasala@iol.cz

Amikeca Reto (FR, 105 Kč), El Popola Ĉinio (CN, 584), Esperantisto Slovaka (SK, 200), Eventoj (HU, 668), Heroldo (CH, 540), Informilo de AEF (CZ, 100), Interligilo de IPETA (BG, 110), Juna Amiko (HU, 130), Komencanto (RU, 409), Kosmos (DK, 204), La Gazeto (FR, 550), La Kancerkliniko (FR, 443), La merkato de IKEF (BE, 376), La Migranto (NL, 90), La Ondo de Esperanto (RU, 542), La Verda Lupeo de ELF (DE, 392), Literatura Foiro (CH, 505), Litova Stelo (LT, 362), Monato (BE, 561), La Jaro (BE, 164), Monda Solidareco (FR, 171), Ondo da Vero (TG, 555), Oomoto (JP, 250), OSIEK (135), Penseo (CN, libervola), RET-Info (HU, 429), Scienco kaj kulturo (RU, 455), Sennaciulo de SAT (FR, 530).

ISSN 1212-009X

85-a UK Tel-Avivo, Israelo

25-a de julio - 1-a de aŭgusto 2000

Kongresa temo:

"Lingvo kaj kulturo de paco"

Laŭ Kongresa Libro partoprenis ĉijaran UK-on dek esperantistoj el Ĉeĥio, sed mi mem ne renkontis ĉiujn. La plej multaj kongresanoj venis el Japanio. Entute partoprenis UK-on 1212 kongresanoj.

La kongresejo estis en hotelo Dan Panorama, kiu staras en apudmara vico de hoteloj. De ĝi bone videblas kaj atingeblas Jafa, la malnova kvartalo de Tel Avivo, kiu mem estis konstruita antaŭ 90 jaroj. La kongresejaj salonoj estis nomitaj - kiel kutime - laŭ eminentuloj de la movado, inter ili ankaŭ laŭ M. Bartovská kaj E. Tvarožek.

Vetero estis varmega (42°C, 65% da humideco) sur stratoj kaj strandoj, sed en hoteloj, kongresejo, busoj kaj vendejoj oni prizorgis freŝan aeron kaj ĉie en la kongresejo estis disponebla trinkakvo.

Kompare kun aliaj UK-oj la salonoj estis malgrandaj, ilia kapacito ofte ne sufiĉis por ĉiuj interesatoj pri programoj, el kiuj plej allogaj estis tiuj pri Israelo mem. Ekzemple: *Tra Israelo ekskurse* (Amri Wandel), *Kio kaj kiu estas judo* (Josef Šemer), *Hebrea kaj araba eksprese* (Eldad Salzman), *Pri juda humuro* (Anat Zajdman), *Seshora kurso pri historio de judoj priskribita de Flavius Josephus* (Věra Barandovská-Frank), teatraĵo *La Poto* de Šalom Aleĥjem (1959-1916, ukraina bonhumora klasikulo en la lingvo jida).

Dum nombraj ekskursoj (Jerusalemo,

Betleĥemo, Morta maro, Masada, Haifo kaj pluaj) ni renkontis mutegajn aliajn turistojn venintajn okaze de jarmilsanĝo.

Kutime UK okazas de sabato ĝis sabato, sed ĉijare pro "sabato" (sabate eĉ trafiko ne funkcias) ĝi okazis de mardo al mardo. Nur merkrede estis solena inaŭguro. La kongreson malfermis per sia preleĝo la prezidanto de UEA, Kep Enderby, analizante la kongresan temon, kiu en Israelo estas pli aktuala ol ie ajn aliloke en la mondo.

Siajn salutojn sendis reprezentantoj de UN, Unesko, Tel-Avivo kaj Israelo. Unuafoje nia kongreso estis oficiale agnoskita de Unesko kiel evento enkadre de "Internacia Jaro de Kulturo de Paco"

La kongreso estis solene fermita mardo, la 1-an de aŭgusto. Pri la kongresa agado informis la kongresa kuriero, kiu ricevis spritan nomon STEL-A VIVO. Okaze de la 85-a UK uzis la apuda poŝtoŝtanco specialan kongresan stampilon, kio ĝojigis ne nur filatelistojn kaj kolektantojn. Grandan intereson pri UK montris la Israelaj radio kaj precipe televido, kiu ses horojn filmis (aŭkcion, internacian vesperon, konversacian rondon, libroservon) kaj intervjuis multajn kongresanojn. La programon ĝi elsendis sabate je la 20-a horo!!!

Malgraŭ la streĉa politika situacio, la kongreso ne estis revokita kiel en 1967 (pli ol 10 tiamaj aliĝintoj partoprenis ĉijare). Hejmen mi revenis plena de impresoj pri la kongreso kaj pri la lando, tre diferenca de la eŭropaj regionoj.

Eliška Mikušová

El salutoj al la kongreso

Kofi Annan, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj: La komenco de nova jarmilo donas al ni unikan okazon por pripensi nian komunan destinon, en momento, kiam ni estas interkonektitaj kiel neniam antaŭe. La avantaĝoj de tutmondiĝo estas evidentaj: pli rapida kresko, pli alta vivnivelo, novaj ebloj. Estas nia tasko certigi, ke tutmondiĝo donu avantaĝojn ne nur al iuj, sed al ĉiuj; ke paco kaj sekureco realiĝu ne nur por kelkaj, sed por multaj; ke ebloj ekzistu ne nur por privilegiitoj, sed por ĉiu homo ĉie. Dum via kunesto en Tel-Avivo, memoru ke ĉiu el ni povas fari ion, por ke nia unueca mondo estu pli bona mondo, kaj ke ĉiu el ni havas la devon eluzi ĉiujn siajn eblojn. UN povas krei eblojn, sed ĝi ne povas devigi vin uzi ilin.

Koïciro Matsuura, ĝenerala direktoro de UNESKO: Estas ege konvene diskuti pri "Lingvo kaj la Kulturo de Paco" en la jaro 2000, proklamita de UN *Internacia Jaro por la Kulturo de Paco*. Unesko vidas lingvon kiel vere la ĉefan rimedon de dialogo, kaj dialogo akcelas interkompreniĝon. Lernado de lingvoj, de lingvoj de aliaj popoloj kaj aliaj kulturoj, estas valora kontribuo al "la laboro por antaŭenigi reciprokan konon kaj interkomprenon de popoloj", kiel difinas la bazajn celojn de Unesko ĝia konstitucio. Lingvolernado malfermas la pordojn de komunikado kun aliaj kaj prezentas ŝancojn krei novajn ligojn de interkompreno kaj amikeco.

Shimon Peres, Alta Protektanto, ministro pri regiona kunlaboro, Nobel-premiito pri paco Mi ĝojas saluti la partoprenantojn de la 85-a UK de Esperanto, kiu unuafoje gastas en Israelo, lando, en kiu la nomo de Zamenhof estas bone konata kaj ornamas grandajn stratojn en multaj urboj. De mia sperto mi admonas vin, ke sonĝoj estas la plej bonaj planoj. Ni lernu aŭskulti unu la alian, ni flegu la kunlaboron en la regiono kaj ni agu en ĉiu ebla lingvo por flegado de kulturo de paco kaj de kreado.

Ron Ĥuldai, urbestro de Tel-Aviv-Jafo: La okulkuracisto d-ro Lazaro Zamenhof revis pri firma kaj stabila ponto, kiu ligas kulturojn, popolojn, naciojn kaj religiojn, ponto, kiu superas diferencojn de kredoj kaj opinioj. Ne ponto el fero kaj betono, sed ponto el vortoj kaj frazoj. En Tel-Aviv-Jafo estas aplikataj ĉiuj tiuj humanismaj principoj, kiuj troviĝas en la bazo de Esperanto. Tiu ĉi urbo akceptas ĉiun personon kaj ĉiun opinion. En ĝi vivas en paca kunekzisto judoj kaj araboj, religiaj kaj sekularaj personoj, veteranaj civitanoj kaj novenmigrantoj kaj ĉiuj vivas en toleremo kaj reciproka respekto.

Natan Wolloch, vicurbestro de Tel-Aviv-Jafo: Vi certe scias ke ĉefa strato en Tel Aviv portas la nomon de d-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kiu estis judo kaj cionisto. Tiu strato estas konata al nia publiko pli ol aliaj stratoj, ĉar tie situas centra medicina instituto, kiu servas milojn.

Prof. Naomi Ĥazan, vicprezidantino de la Israela Parlamento: La esperantistoj kunportas al la unua Universala Kongreso de la nuna miljaro ne nur la provon eltrovi universalan lingvon, kiu faciligu la internacian komunikadon, sed ankaŭ fortan volon krei ponton trans la diferencoj naciaj kaj etnaj. Tia mesaĝo de interhoma amikeco estas speciale grava en nia regiono, kaj speciale nun, kiam ni troviĝas antaŭ gravegaj decidoj kiuj restrukturos nian estontecon kaj la estonton de nia regiono.

Josi Sarid, eksministro de kulturo: La tuta mondo, inkluzive Israelon kaj mezorienton bezonas treege la lingvon Esperanto kaj la tiom gravan mesaĝon, kiun ĝi disvastigas inter la homoj. Mi bondeziras vin pro via decido okupiĝi en tiu ĉi kongreso pri la kunvivado inter judoj kaj araboj en Israelo, tiel sur la regiona kampo, inter ni kaj niaj najbaroj, kiel sur la interna kampo inter judoj kaj araboj, civitanoj de Israelo. Okupiĝu en viaj debatoj pri la manieroj helpi vin per la kulturo kaj la lingvo kiel rimedo por edukado al paco, kunekzistado, toleremo, interkomunikiĝo kaj kompreniĝo inter kaj ene de popolo kaj naciaj, ŝtataj kaj establaĵ.

D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof (nepo de la Majstro): Saluton al vi, venintaj de tre diversaj, proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur nia terĝlobo, por kongresi, ĉe la sojlo de miljaroj, en la patrolando de popolo, ene de kiu la Iniciatinto de nia Lingvo serĉis iam siajn antikvajn originojn. Vi venis kongresi al la patrolando

de Abrahamo, de Jakobo, de Moseo kaj de Kristo, sed ankaŭ patrolando de Hillelo, teologo vivinta tie antaŭ ĝuste du miljaroj, filozofo, kies ideoj inspiris iamaniere la Zamenhofajn.

Vi venis al la sankta lando de tri grandaj religioj, lando de Dio, "kiun ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro (Lin) sentas".

Vi alvenis tien en la Jaro de Kulturo de Paco, do, laŭ la difino de Unesko, jaro de la kompreno, de la toleremo kaj de la solidareco inter la popoloj kaj inter iliaj kulturoj. Kulturo de Paco, signifanta kulturon de valoroj, de kondutoj, gvidantaj senperforte al universala justeco garantianta al ĉiu ajn la vivantan realecon de homaj rajtoj. Kulturo de Paco, kontraŭstaranta la minacon de pereco de la diverseco de nia spirita heredaĵo, kies postlason ni ŝuldas al la estontaj generacioj.

Vi venis por debati la rolon de la Lingvo ene de tiu Kulturo de Paco, debati la rolon de la Lingvo kiel vehiklo de la kultura diverseco, diverseco prezentanta substancan faktoron de la spirita riĉeco de la homaro. Vi venis por debati la rolon de la Lingvo Neŭtrala, lingvo ne ambicianta anstataŭi iun ajn lingvon nacian, ŝirmon de nacia kulturo, tamen, en ĝia rolo de Lingvo Internacia, kontribuanta al la kompreno kaj, pere de kompreno, al la toleremo de kulturo de la najbaro. Lingvo servanta tiamaniere la ĉefajn faktorojn de la Kulturo de Paco. Ĉar nia Lingvo Neŭtrala portas en si implicite la Zamenhofan idealon de toleremo kaj de la amikeco, de la frateco interhoma.

El la inaŭgura parolo de Kep Enderby, prezidanto de UEA

Mi volas sugestii ke, simbole kaj loke, tiu ĉi Tel-Aviva kongreso estas elstara evento, kaj por UEA kaj por Esperanto ĝenerale. Ĝi ne nur daŭrigas la politikon de UEA kongresi en tiom da landoj tra la mondo, kiom eblas, kaj farante tion, elmontri la uzon de Esperanto kiel utila helpilo en la praktikaj aferoj de la nuntempa mondo, sed ankaŭ, almenaŭ simbole, identigi Esperanton kun ĉiuj aliaj personoj de bona volo, kiuj strebas havigi pacon tra la mondo.

Por iuj el ili aparte, tiu ĉi kongreso estas emocia kaj grava evento, ĉar d-ro Zamenhof estis judo kaj fieris pri sia judeco. Tute aldone al tia emocia ligo de d-ro Zamenhof al la kongreso, elstara ekzemplo de la laboroj de UEA, estis la seminario, kiu okazis antaŭ kelkaj tagoj en Amano (Jordanio), kun la temo "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj".

Sekvas de tio, ke la fundamenta pravigo de niaj klopodoj, eĉ pli grava ol la disvastigo de Esperanto mem, estas la celo helpi plipacigi rilatojn inter diversaj popoloj de la mondo. Mi ne konsideras herezaĵo diri, ke la disvastigo de E-o mem estas nur grava ilo por tion fari.

Multaj suprajaj pensantoj opiniemas, ke lingvo estas nur komunikilo inter homoj. Lingvo sendube estas tia, sed ĝi ankaŭ estas multe pli ol tio. Aliaj akceptas, ke lingvo estas pli ol nur komunikilo, kaj opinias, ke por plenigi la signifon, sufiĉas aldoni, ke ĝi ankaŭ estas identigilo de malsam-etnaj aŭ malsam-

raciaj popoloj. Mi volas sugestii, ke tiuj lastaj opinioj ankaŭ subtaksas la tutan veran rolon de lingvo.

Mi devas diri, ke miaopinie niaj kritikantoj ofte pravas: ke unu el la kialoj por nia manko da sukceso estas la fakto, ke ni agas kvazaŭ ni kredas, ke rego de Esperanto sole sufiĉas por solvi la problemojn de la mondo. Tiaj niaj plendoj ĝenerale falas sur surdajn orelojn. Aspekti kiel utopiemaj idealistoj, pacamantoj, al kiuj mankas praktikaj rimedoj, nepre ne sufiĉas. Mi scias ke tio ne estas vero, sed tio ja estas la apero, kiun ni prezentas tro ofte al nia ĉirkaŭanta neesperanta mondo. Kiel komunumo, kiu ankaŭ estas movado, iel, ni devas salti kvalite el nia nuntempa situacio por atingi novan etapon en nia evoluo.

Saluto de Amri Wandel, prezidanto de LKK

En 1967, pro la tiama milito, ne okazis UK en Tel Avivo. Unu salono de nia kongresejo portas la nomon de la prezianto de ĝia LKK, mag. Isai Dratwer. Tridek tri jaroj pasis ĝis UEA kaj la Israela E-movado aŭdacis reprovii organizi UKn en Israelo. Tio estis kuraĝa decido de UEA pro la risko, sed necesa por montri, ke UEA estas vere tutmonda. Ĉifoje la kongreso okazas, ne en la ombro de milito, sed kun la espero de pactraktadoj. Ĝi estis kuraĝa decido ankaŭ por la Israela movado, kiu laŭ iuj ne estas sufiĉe forta por okazigi UKn. Tamen tiu ĉi kongreso ne povus okazi sen la entuziasmo kaj la sindonema laboro de malgrada teamo de la LKK.

KUNVENO PRI LA KULTURPOLITIKO DE UEA

Ĉeestis 30 homoj, gvidis Michela Lipari. Post prezento de la kultura agado de UEA (eldonado, Belartaj konkursoj, Serio Oriento-Okcidento), kaj de festivaloj kiel KAFE en Francio, aŭ KEF en Skandio, sekvis diskuto ĉu UEA devas aŭ povas havi kulturpolitikon; kiel ĝi povas influi, ĉar Unesko mem ŝanĝis sian ideon pri kulturo. Ni eventuale dediĉu Universalan Kongreson al nia propra kulturo, esperigante la esperantistojn. Ni ankaŭ instigu la esperantistojn sendi librojn al malpli favorigitaj kluboj tra la mondo. UEA subtenu la iniciatojn (vidbendoj pri teatraĵoj, kompilado de tradukaĵoj, ktp). Ĉar sola estrarano ne povas ĉion fari, kunlaborantoj estas bonvenaj.

KONGRESA TEMO KIA KULTURO? KIA PACO? KIA LINGVO?

En tiu ĉi unua prezento de la kongresa temo, Humphrey Tonkin levis kelkajn demandojn por konsidero de la ĉeestantoj.

1. Ĉu Esperanto estas aŭtentike alia ol aliaj lingvoj? Ĉu ĝi vere povas roli kiel lingvo de la paco?

2. Se jes, ĉu ni devas ŝanĝi la metodojn, kiujn ni uzas por utiligi kaj disvastigi Esperanton?

3. Kiujn konkretajn paŝojn ni povas fari

por plifortigi la rolon de Esperanto kiel lingvo de la paco?

4. Kiun rolon ni povas ludi kiel privataj civitanoj en la lukto por pli justa mondo kaj la kreo de kulturo de paco?

5. Kiel mastrumi mondon de multaj kulturoj kaj multaj lingvoj?

ESTRARO RESPONDAS

Viglis, kiel kutime, la neformala renkontiĝo de la Estraro kun la membraro de UEA. La pridemandado tuŝis plurajn temojn ekde la malfacilaĵoj por blinduloj partopreni UK-oj al la rolo de estrarano pri kulturo. Apartan atenton oni dediĉis al la utiligo de Interreto en la nuna interna kaj ekstera informado kaj kiom UEA ekspluatas ties eblecojn. Kiel kutime, la publiko prezentis ankaŭ plendojn ligitajn al la nuna kongreso, kun aparta atento al la problemoj ĉe junulgastejoj, al la maltaŭgeco de la kongresejo ktp. La ĉeestantaro starigis poste demandojn pri la estontaj UK-oj: kiel oni elektas landon, urbon, ejon. Kaj fine oni tuŝis politikajn temojn kiel la neŭtralecon de UEA kaj la alvenintajn dum la jaro plendojn rilate la nunan UK-on.

ĈU VI SCIAS, KE... .

... en Belizo. Dominika Respubliko, Gvatemalo, Haitio, Honduraso, Kubo, Panamo, Petuo kaj Salvadoro estas multaj dezirantoj lerni nian lingvon, sed la manko de lernomaterialo estas granda malhelpo? Por provizi la menciitajn landojn per taŭgaj instruiloj estas bezonataj 1.000,- eŭroj....



BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2000

POEZIO:

1-a premio: Mikaelo Gišpling (Israelo) pro "Neĝa fantazio"; **2-a kaj 3-a premioj:** ne aljuĝitaj.

Honoraj mencioj: Stefan MacGill (Hungario) pro "Letere etere", kaj Nikola Rašić (Nederlando) pro "Telefonvoko al postmodemo". Partoprenis 40 poemoj de 17 aŭtoroj el 12 landoj.

PROZO:

1-a premio: Julia Sigmond (Rumanio) pro "Mi ne estas Mona Lisa";

2-a kaj 3-a premioj: ne aljuĝitaj.

Honoraj mencioj: Claude Schroeder (Francio) pro "Amletero" kaj Tiboc Kristaly (Hungario) pro "Leon-vilaĝo". Partoprenis 11 verkoj de 8 aŭtoroj el 8 landoj.

TEATRAĴOJ:

Neniu premio aljuĝita. Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro.

ESEO:

Premio "Luigi Minnaja": Sten Johansson (Svedio) pro "Kiel legi - ĉu legi - Stellan Engholm?";

2-a premio: Nikola Rašić (Nederlando) pro "Digrafio: speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo";

3-a premio: Sten Johansson pro "Belartaj

Konkursoj de UEA 1950-1999";

Honora mencio: Carmel Mallia (Malto) pro "La vojo". Partoprenis 4 esoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

KANTO

Premio "Ahn Song-san pri Kanto": Tarcisio Lima (Brazilo) pro "Diskanto" kaj "Ĉi-paĝa dezir";

2-a premio: Anja Karkiainen kaj Vesa Polkki (Finnlando; resp. teksto kaj muziko) pro "La koroj batu";

3-a premio: ne aljuĝita.

Partoprenis 6 kantoj de 4 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 3 landoj.

INFANLIBRO:

Premio "Infanlibro de la Jaro 1999": "La avo en la ĉareto" de Gudrun Pausewang, tradukita el la germana kaj eldonita de Nora Caragea (Germanio). Partoprenis 5 libroj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

VIDBENDO

(La konkursaĵoj prijuĝotaj dum la UK; la rezulto anoncota en la Fermo.)

INTERESAĴOJ PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ

Dum la kunveno de Belartaj Konkursoj, dum kiu enkonduke parolis Vilmos Benczik, prezidanto de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj, ni aŭdis, ke ĝis nun 600 verkistoj estis premiitaj. El tiuj 600 premioj, al Marjorie Boulton iris 22 premioj. La plej multajn premiojn en la 51-jara ekzisto de la Belartaj Konkursoj gajnis Britio - pli ol 100 premiojn, dum la duan lokon okupas Hungario kaj la trian Italio.



PRIORITATO AFRIKO

Dum du kunvenoj estis akceptita la ĉi-sekva agad-programo de UEA. La vorto "prioritato" montras la punktojn, kiujn afrikanoj trovas prioritatajn en sia agado.

1-a punkto: Esperanto: lingvo afrika - Temas pri komenca instruado de la lingvo al afrikanoj. Pli da emfazo estu donata al instruado pere de afrikaj lingvoj, al instruado fare de afrikanoj mem, al instruado de perfektigaj kursoj, al tradukado al Esperanto de literaturaj verkoj en afrikaj lingvoj, al verkado de libroj fare de afrikanoj.

2-a punkto: Esperanto: movado afrika - Temas pri klopodoj por stabiligi la movadon en landoj, kie ĝi ekzistas, doni prestiĝon al ekzistantaj Landaj Asocioj kaj fondi aliajn en landoj, en kiuj ili ne ekzistas. Ankaŭ pri la stabiligo de la Afrika Oficejo temas ĉi tiu punkto. La landaj movadoj komencu financi sin mem kaj gvidi la informadon ankaŭ al lando, kie nun ne estas esperantistoj.

3-a punkto: Esperanto-lernejoj - Temas pri malfermo de lernejoj en afrikaj landoj: akirado de grundo kaj konstruado sur ĝi

de la lernejo. En ĉiu lando, la lernejoj funkcii kiel normala enlanda lernejo laŭ la enlandaj leĝoj, kaj Esperanto estu instruata en ili. La unua eksperimento okazos en Togolando.

4-a punkto: Helpe al afrikaj lernejoj - Kolektado de eŭroplingvaj lernolibroj, ĉefe pri teknikaj fakoj, kaj donacado de ili al afrikaj lernejoj.

5-a punkto: Fondado Afriko - Temas pri kolektado de sufiĉe granda kapitalo, el kies rento oni povos financi la agadon en Afriko.

6-a punkto: Realigo de etaj projektoj - Temas pri trovado de helporganizoj, grupoj aŭ unuopuloj, kiuj financu projektojn de afrikaj esperantistoj (bestobredado, agrokulturo, fiŝado, ktp.)

7-a punkto: Integriĝo de Afriko en la tutmonda Esperanto-komunumo - Ne manku afrikanoj en la gvidorganoj de la internaciaj Esperanto-organizaĵoj, precipe TEJO kaj UEA. Estu klopodoj, ke afrikanoj povu ofici en la CO de UEA, volontuli por UEA aŭ TEJO.

INFANA KONGRESETO VIGLAS

Rapide amikiĝis la 18 infanoj, eĉ kelkaj antaŭ ekiri al la kongresejo, junulara vilaĝo Hadassim, 30 km norde de Tel Aviv. Pro la multaj devenlandoj (CA, FR, DE, HR, HU, IL, JP, NO, RO) eblecoj krokodili mirinde malgrandas. Duono de la infanoj estas denaskuloj; ĉe aliaj la nivelo tre varias - kiam infana ludado postulas komunikadon, oni atingas mirigajn solvojn kaj progreson.

KUNVENO DE EPĈ-LEGANTOJ

En la salono Hodler kunvenis legantoj de "El Popola Ĉinio" kun la redaktoro kaj redakcianoj. La gazeto en majo festis sian 50-jariĝon. Estis proponoj, ke la gazeto iom ŝanĝu la redakciajn tekstojn, aperigu pli da literaturaĵoj, pli da tekstoj pri Esperanto tra la mondo, eĉ pri apero de la infana paĝo.

Plie okazis ankaŭ kunveno de aŭskultantoj de Ĉina Esperanto-Radio Internacia (antaŭ nelonge festinta 35-an datrevenon), kiu ne estas aŭdebla tra la tuta mondo - se ĝi atingebus pere de interreto, la aŭskultantoj dekobliĝus.

MEDICINISTA KUNVENO

Ĵaŭde en la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), 28 personoj el 15 landoj. Prezidanta d-ro I. Ferenczy raportis inter alie pri la sukcesa kunlaboro kun la fervojistoj (IFEF), dum kies E-kongresoj UMEA sanitaro deĵoris, intersanĝis eldonajojn ktp.

La ĉijaran UMEA-Shinoda-premion ricevis s-ino Gu Jienhua (Ĉinio) pro vortaro Esperanta-ĉina-angla. Venontjare UMEA deziras inde festi la 100-jaran naskiĝdatreveno de d-ro Hideo Shinoda, iama prezidanto de la Asocio, mortinta en 1984. La Internacia medicinista E-konferenco okazos en la urbo OSIJEK, antaŭ la Zagreba UK.

FERVOJISTA KUNVENO

Vendrede okazis la kontaktkunveno de IFEF (21 kongresanoj el 11 landoj) sub prezido de Istvan Gulyas, la vicprezidanto, raportinta pri la pasinta IFEF-kongreso.

En la nomo de la Estraro de UEA Petro Chrdle salutis la ĉeestantojn, kaj detale informis pri la sekvontjara IFEF-kongreso okazonta en Tábor (Ĉeĥio).

D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA faris fakprelegon pri la spertoj de la kunlaboro inter fervojistoj kaj medicinistoj.

SAT-KUNVENO

Ĵaŭde en la Maschler-salono Yamasaki Seiko gvidis SAT-kunvenon de 40 homoj, el kiuj 14 nemembroj de SAT. La SAT-plenumkomitato reprezentis Floreal Gabalda, nome de faka agado de UEA salutis Petro Chrdle kaj sian mesaĝon sendis Yves Peyrant. El diskutoj ni prezentas jenajn:

- Jacques Caubel rekomendas klare aperigi la landnomojn, sed oni respondis, ke SAT-membroj estas mondcivitanoj, kaj tial la landnomo ne gravas.

- Margarete Bettmann demandis, ĉu estas arabaj SAT-membroj. Ĉar la asocio ne atentis pri tiaj statistikoj, la demando estas malfacile respondebla. Ĉiuj, kompreneble ankaŭ araboj, estas bonvenaj en SAT

- Vincent Charlot petis pri raporto el la ĵus okazinta SAT-kongreso en Moskvo. Yamasaki, kiu partoprenis nur dum 3 tagoj, donis skizon. Li aparte elstarigis la proponon de Martin Bustin, kiu sugestis, ke la SAT-plenumkomitatoj ne devige estu nur en la sama urbo.

Kep Enderby, SAT-membro, nuna prezidanto de UEA, elstarigis, ke la nocioj pri naciismo, naciulo estas nur en la homaj mensoj, ĉar la homoj nur hazarde naskiĝas en unu aŭ alia loko.

VIRINA KUNVENO NE MANKIS

Ĵaŭde en la salono Maschler okazis la kunveno de Virina Agado, fondita antaŭ du jaroj. Ĉeestis 25 homoj kaj gvidis f-ino CHOI YUN HUY, Hortensio.

Estis kelkaj proponoj:

- ni aliĝu al UEA en baldaŭa estonteco,
- ni elektu multe da virinoj agemaj kaj laboremaj en Esperantujo.
- ni laboru ne nur ene de movado, sed ankaŭ ekster ĝi.
- ni interŝanĝu opiniojn kaj proponu per ret-poŝto.

Ne mankis kritikoj pri la diskriminacio inter viroj kaj virinoj:

- ofte oni elektas virojn por labori kaj virinojn por ornamo eĉ en Esperantujo.

Korekto de grava miskompreno: nia virina movado ne estas feminisma.

Laste gvidantino proponis, ke ni havu propran hejmpaĝon se eblas.

Apartan dankon al viraj ĉeestantoj, speciale al d-ro Werner Bormann.

JARKUNVENO DE NEFUMANTOJ

En la salono Maschler, la 30-an de julio 2000, okazis Jarkunveno de nefumantoj TADEN, kun 20 partoprenantoj.

La prezidanto kaj redaktoro de "Puraj Pulmoj", s-ro Jan Bemelmans, donis la ĝeneralajn informojn: kio estas TADEN, kio estas ĝia agadkampo kaj informis pri evoluo de scioj kontraŭ fumado kaj fumismo, sed ankaŭ pri kuracado de kancero kaj aliaj malsanoj. Estis sugestite ke en la kongresa regularo aperu artikolo pri nefumado en la kongresejo. Ja sonis kritiko al tiuj, kiuj fumĝenis la malimunajn. Sian starpunkton esprimis

en sia salutletero Marjorie Boulton.

JARKUNVENO DE ISAE

Dudeko da interesatoj pri sciencaj aferoj, inter ili 6 ISAE-anoj, ĉeestis vendrede, la 28-an de julio, la laŭstatutan dumkongresan jarkunvenon de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista). La prezidanta raporto informis pri la rezulto de la komencjara balotado: elektigis por la nova ISAE-estraro prof. Eichner (Aŭstrio), prof. Haszpra (Hungario), s-ro Sugano (Japanio), d-ro Weichert (Svedio) kaj prof. Sachs (Germanio) - la lastnomita samtempe estis elektita ISAE-prezidanto. La estraro do respondecas por la asociaj aktivecoj dum la trijara estrarperiodo ĝis 2002.

ISAE, en kiu unuiĝas fakuloj kaj interesiĝantoj pri sciencaj aferoj, celas la disvastigadon de la Internacia Lingvo en ĉiujn sciencajn kaj teknikajn sferojn. Al tiu celo servas ankaŭ la asocia organo "Scienca Revuo", kiu peras sciadon pere de originalaj artikoloj kaj aliaj sciindaĵoj el la vasta mondo de scienco.

Estas projektita la eldono de prifakaj kompendioj kiel kromkajeroj al Scienca Revuo por subteni la instiudadon de studentoj, ekz. kadre de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Per pligrandigo de la delegita reto de ISAE kaj reaktivigo de la statutaj ebloj por krei landajn filiojn kaj fakajn sekciojn; ISAE celas pli efikan sciencan laboron. La nova estraro ankaŭ alstrebas kunlaboron en terminologio, ekz. kadre de la regule en Prago okazanta Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), same kiel pli da faka interŝanĝo kun la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).

LA TUTA MONDO AŬDAS NIN

ILERA, la Internacia Ligo de Esperanto-radio-amatoroj, havas amatoran radio-stacion en ĉambro 1823 de tiu ĉi hotelo (Dan Panorama!). Grandan antenon ni starigis sur la tegmento. Ĝi estas tre efika, tiel ke ni jam atingis radio-amatorojn en ĉiuj kontinentoj. Ni atingis multajn landojn. Inter ili estis i.a. Brazilio, Usono, Aruba-insuloj, Ĉinio, Japanio, Kubo, kaj ĉiuj landoj de Eŭropo. Eĉ la Antarktikon ni kontaktis kaj tien informis, ke Esperanto vivas kaj bone funkcias. Entute ĝis hieraŭ ni kontaktis pli ol 1700 staciojn, inter ili diversajn en Especanto.

Krom mikrofonon kaj morso-klavon ni ankaŭ uzas komputilon por skribaj komunikoj simile kiel en intetreto.

Post la kongreso ĉiu partnero ricevos nian konfirmkarton kiel memorigilon, memkompreneble presitan en Esperanto.

FAKKUNSIDO DE OOMOTO

La fakkunsido de Oomoto okazis sub la titolo de la kongresa temo jaŭde en la salono Zamenhof. Oni prezentis preĝon por mondpaco per ŝintoisma rito, Ludon de Jakumokotoo (japana tradicia dukorda citaro), du kantojn el "Aizenka" (Amobonaj kantoj), prelegon pri la kongresa temo, lumbildojn pri Oomoto-agado, japanan dancon, aikidon (unu el japanaj batalartoj) kaj te-ceremonion. En ĝi ĉirkaŭ 200 personoj partoprenis kaj gustumis "matĉa"-n (japanan verdan teon).

JURISTOJ KUNSIDIS

Jaŭde 12 membroj de la Esperanta Jura Asocio (EJA) kunvenis, prezidate de Kep Enderby. Disdoninte la lastan numeron de "Jura Tribuno Internacia", oni laŭdis la bonan laboron de ĝia redaktoro s-ro Jose Maria Rodriguez. Inter kelkaj interesaj proponoj aperis tiu de advokato s-ro Faria de Bastos el Portugalio pri starigo de reto de advokatejoj en la Eŭropa Unio, pri verkado de artikoloj en la revuo pri diverslandaj sistemoj pri civila kaj krima juroj, kaj pri la studo de ebleco, ke nia asocio aliĝu al la Internacia Jura Asocio.

JARĈEFKUNVENO DE IKEF

En la jaŭda Ĝenerala Kunveno de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) 20 ĉeestintoj aŭskultis la raporton pri la agado de IKEF en 1999 de prezidanto Franz Josef Braun. La jaro 1999 estis sukcesa: la nombro de membroj plialtiĝis de 136 al 149; la eldono de "INKOTERMOJ 2000" estis laŭplane realigita por ĉi tiu kongreso kaj establiĝis nova retpaĝo (www.ikef.org).

En la elektoj estis reelektitaj prezidanto Braun kaj la estraranoj d-ro Rainer Kurz (Germanio) kaj s-ro WANG Tianyi (Ĉinio), de kiuj la dujara oficperiodo finiĝos ĉimonte. Ĉefa temo en la diskutado estis la estonta terminara laboro. Oni decidis, ke la "Laborplano 1998-2000" establita kaj akceptita en 1998 en Montpeliero kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo, estos daŭrigata je pliaj 3 jaroj, do ĝis 2003.

KUNVENO DE AERA

Kvankam la Radio Varsovo elsendas jam 41 jarojn, Ĉina Radio Internacia 35 jarojn. Radio Havano - 12 jarojn - estis interese aŭdi, ke elsendas ankaŭ Radio Bratislavo, Radio Vieno, Radio Romo, Radio Koreio... kaj ke radio elsendoj en la Internacia Lingvo estas aŭskulteblaj je alia flanko de la mondo. Tamen, por ke ĝi fariĝu pli aŭdebla kaj vere internacia, la programo devas orientiĝi al interreto. Oni enkondukas rubrikojn pri NATO. la Eŭropa Unio, religio, literaturo kaj porinfanan rubrikon.

PERDITA KAJ RETROVITA CELO

Multaj el ni perdis ie survoje dum la jaroj la veran celon de nia agado, sed vendrede ni provis retrovi ĝin. Atilio Orellana Rojas prelegis pri la projekto "Indiĝenaj Dialogoj", kiu celas uzi Esperanton kaj la interreton kiel ilon de rekta komunikado inter la homgrupoj, kiuj plej multe bezonas ĝin. Jam post la du unuaj kursoj realiĝas rekta komunikado inter kontaktpersonoj de Tlingita (Alasko), Ŝora, Samea kaj Komia (Rusio), Mapuĉa (Ĉilio) kaj Majaa (Gvatemalo), Brunka kaj Bribria (Kostariko), Batva (Ruando), Manipura, Ho, Bodo kaj Garasia (Barato), Papua (Novgineo), Tamang (Nepalo), Tamaŝeka (Burkino.. Niegero kaj Maŭritanio), Berbera (Maroko). Admirinda komenco.



POŝTISTOJ

En la ĉefkunveno de IPTEA (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio) la prez. Veikko Maki-Luopa el Finnlando prelegis pri la plej nova telekomunikada servo t.n. INTERNET (Interreto), kiu ekfunkciis komence en Usono en 1969 fare de la tiea Ministerio pri Defendo. Hodiaŭ ĉiun kvinan sekundon al la Interreto estas aligita nova komputero, do pli ol 6 milionojn jare.

Per Interreto oni povas telekomuniki ne nur tekstojn kaj bildojn, sed ankaŭ aŭskulti muzikon kaj rigardi TV-programojn. Oni povas "foliumi" aŭ "surfadi" retpaĝojn, faritajn de diversaj gazetoj, TV-kanaloj, entreprenoj, lernejoj, aŭ ordinaraj homoj.

Kolektantino de uzitaj telefonkartoj el Slovakio proponis al la IPTEA, aldoni al la filatelo novan branĉon, kiu povus esti nomata "telefonkart-kolektado". Ŝi jam prezentis multajn tiajn kartojn kun belaj fotoj kaj desegnaĵoj.

ĴURNALISTOJ KUNVENIS

Kunveno de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) laŭtlegis saluton de la malsana Prezidanto S. Maul: "Kiel scias precipe la ĵurnalistoj inter vi, la ankoraŭ daŭranta revolucio en komunikado - precipe la pli kaj pli potenca intetreto - draste ŝanĝis kaj ŝanĝos ankaŭ laboradon de ĵurnalistoj. Bedaŭrinde la teknika progreso ofte estas akompanata de perdo de kvalito. Rapideco pli gravas ol solida informado. distro pli gravas ol serioza enhavo ktp. Jen defio por konsciaj ĵurnalistoj."

KONGRESA REZOLUCIO

La 85-a UK **deklaras ke:**

- en tiu ĉi Internacia Jaro de Kulturo de Paco necesas refortigi la tutmondajn klopodojn trovi komunajn kulturajn valorojn kaj interkonsentojn cele al konstruo de tutmonda Kulturo de Paco;

- tio ĉi okazos nur, se en la mensoj de la homoj ni komune kreas tiun kulturon, ĉar daŭra paco estas konstruata nur en la mensoj de homoj;

- en tiu ĉi mondoparto, la Meza Oriento, kie kunvenas malsamaj kulturoj, kaj kie riĉa historio samtempe unuigas kaj dividas homojn, apartaj streboj estas bezonataj kaj jam farataj en serĉado de paco:

- kondiĉo por paco estas la respekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj inkluzive de la lingvaj rajtoj de ĉiuj konfliktantaj grupoj;

- la internacia lingvo Esperanto estas kreita ĝuste por ebligi kulturon de paco inter malsamaj gentoj kaj pro sia neŭtraleco kaj pro sia rekono de la digno kaj samvaloro de ĉiuj hom-grupoj ĝi donas grundon, sur kiu valoroj de paco povas flori;

alvokas ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn

- ke ili decide ek-respektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenu la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo;

deklaras la pretecon de la E-movado:

- plulabori por kulturo de paco en la mondo surbaze de reciproka respekto kaj

egalvaloro de ĉiuj gentoj kaj hom-grupoj grandaj kaj malgrandaj;

- agi ĉie, kie paco estas minacata, apoge al la ceteraj klopodoj de la internacia komunumo;

esprimas

- sian admiron kaj subtenon al la klopodoj de la homoj de ĉi tiu regiono, kiuj laboras por keci la eblecon de kulturo de paco, kiu estas antaŭkondiĉo por alveni al situacio de paca kunvivado kaj de respekto ambaŭflanka de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.

ALVOKO DE AMANO

Partoprenantoj de la 1-a Seminario "Tutmondigo kaj la arabaj landoj" en la jordana Amano, proponas al UEA jenajn punktojn:

1) UEA disvastigu E-on precipe en landoj, kie ne ekzistas lokaj fortoj;

2) Niajn limigitajn fortojn ni koncentru ĉefe je unu-du el la arabaj landoj por krei esperantistojn kapablajn disvastigi la lingvon en pliaj arabaj landoj;

3) La facile alirebla Jordanujo kun favoraj kondiĉoj estu unu el tiuj landoj;

4) Komencaj paŝoj estu: a) pretigo de taŭgaj arablingvaj inform-materialoj; b) organizado de kurso en Jordanujo per utiligo de lokaj fortoj kaj internacia helpo; c) informado de universitatuloj en la koncernaj landoj cele al organizado de komunik-reto kaj eventuale por informi la fakulojn pri la valoro de Esperanto kiel universitata stud-objekto; ĉ) konsversacioj inter la araba komisiono de UEA kaj israelaj esperantistoj pri la manieroj laŭ kiuj ili povas helpi en tiu ĉi iniciato.

Amano, la 24-an de julio 2000

Agrablaj tagoj en J. Láz

Semajno riĉa je spiritaj travivaĵoj, amikaj kontaktoj, komuna kantado kaj agrablaj promenoj en bela submontara banurbeto Jánské Lázně fariĝis la jubilea 50-a kongreso de KELI, kiu okazis en la tagoj 5.-12.8. Partoprenis ĝin kvindeko da samideanoj el 11 landoj frunte kun KELI-estraranoj A. Burkhardt, P. Couson kaj aliaj. La organizan laboron plenumis kaj tutan programon preparis modele P. Polnický helpata de siaj familianoj. Al la ĉefaj programeroj krom jarkunveno de KELI kaj ĝia estrarkunsido apartenis serio da prelegoj dediĉitaj prefere al kulturo de la gastiganta lando. La programo kulminis en du vesperaj artaj koncertoj, unu el ili publike anoncita allogis ankaŭ nesesperantistan aŭskultantaron. Tuttaga ekskurso konatigis la kongresanojn kun Kuks, Náchod kaj "Valo de avinjo" apud Ratibořice. Surloke oni alrememorigis bazan rolon de la ĉefverko de B. Nĕmcová, kies infanaĝo en ĝi respeguliĝas. La kongresa semajno kompreneble ne malhavis diservojn kaj tagajn preĝojn, kiujn ankaŭ mi - nur rezervena kredanto - ŝate ĉeestis. Eksterordinare min impresis ankaŭ samtempa escepta evento - la ordino de nova loka predikisto, kiun plenumis la ĉefo de la koncerna ĉeĥa protestanta eklezio d-ro P. Smetana, bona amiko de Esperanto, en komenca tago de la kongreso: Siajn spektantojn trovis ankaŭ samtempa ekspozicio de ĉeestanta pentristo V. Lamr en navo de evangelika preĝejo. Al plusoj de tiu ĉi Esperanto-renkontiĝo mi aldonu

bonkvalitan loĝigon kaj eminentan manĝadon, kiun preparis afabla kolektivo de la pensiono Sola Fide, en kiu la kongreso okazis.

Jam longan tempon mi ne spertis tiel agrablan semajnon kiel ĉijare dum la KELI-kongreso.

V. Kočvara

Bonan vojon, Cigano!

250 delegitoj el kvardek landoj julie kunvenintaj en Prago el Eŭropo, Afriko, Aŭstralio kaj Latin-Ameriko, okaze de la 5-a mondkongreso de la ciganoj, decidis la naskon de nova subjekto de internacia juro: Cigano.

Laŭ la reprezentantoj de la tri ciganaĵ etnoj (roŭma, sintha, kalea) temos pri senteritoria civito, kun propraj flago, himno kaj parlamento: ili ĉiuj estis elektitaj en Prago. La cigana flago estas blue-verda kun ĉara rado, kiu simbolas la vagadon kaj serĉadon de la propraj identeco kaj lando. La cigana himnon *Gelem, gelem* kun la tradicia temperamento kantis ĉe la inaŭguro la fama rusa kantistino Ljubov Demetrova. La parlamento (kun 45 membroj) havos la sidejon en Bratislavo, kie situos ankaŭ la unua cigana universitato. La literaturo en roŭma lingvo havas propran PEN-centron en Berlino.

Inter la celoj de la mondkongreso, organizita de Internacia Roŭma Unio, estis la apro de *stabiliga programo* por helpo al la ciganoj en ĉiuj landoj de Eŭropo, kie vivas ok el dek du milionoj da diasporaj ciganoj.

laŭ G. Silfer, HdE

OSIEK

už takmer 15 rokov pravidelne každoročne poriada Medzinárodné esperantské konferencie na rôzne odborné témy ako napríklad *Ideológia a esperanto*, *Jazyk a kultúra*, *Xenofobia - príčiny a protiviedky*, *Grécke vplyvy vo svetovej kultúre* a na iné odborné témy.

V minulom roku (1999) ústrednou témou Medzinárodnej esperantskej konferencie v Metz (Francúzsko) bola téma *Peniaze a civilizácia* - inak veľmi aktuálna, ku ktorej odzneli prednášky ako napríklad *Európska centrálna banka v živote Európanov*, *Mena "euro" - nádej 21. storočia*, *Peniaze a ázijské civilizácie*, *Peniaze v prechodnej epoche*, ale aj viaceré veľmi konkrétne prednášky ako napríklad *Priemysel v Lotrínsku*, *Austrálski domorodci (aborigenoj) a moderná ekonomia* alebo *Minulosť a súčasnosť mesta Metz*, *Hodnoty esperantskej literatúry* atď.

Avšak Medzinárodné esperantské konferencie organizované OSIEK-om nie sú len odborné prednášky a diskusie, ale predovšetkým aj výborná medzinárodná atmosféra - absolútne liberálna a priateľská, poznávanie regionu, v ktorom sa konferencia koná, družné posedenia, návšteva kultúrnych podujatí a významných historických pamiatok v mieste, zaujímavé exkurzie atď. podľa konkrétnej situácie a možností v danom regióne.

Doteraz sa uvedené konferencie konali v rôznych mestách a krajinách ako La Chaux-de-Fonds, Tinje-Tainach

(Rakúsko), Atény, Poprad, Kondoros (Maďarsko), Homburg (Nemecko), Varšava, Trieste, Metz a v budúcom roku (2001) to bude Strážnice v Českej Republike.

Podľa doterajších zistení o Medzinárodnú esperantskú konferenciu v Strážnici je značný záujem a prípravný výbor by samozrejme predovšetkým potešil aj záujem esperantistov z Českej Republiky, ktorá mala na doterajších podujatiach organizovaných OSIEK-om pomerne malé zastúpenie, a preto už teraz pozývame českých esperantistov (aj nečlenov OSIEK-u), aby sa zúčastnili na Medzinárodnej konferencii v Strážnici v roku 2001.

prof. Ján Göldrích
OSIEK-komitatano

OSIEK-konferenco pri la ĉeĥa verkisto Karolo Piĉ

OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) preparas por la jaro 2001 konferencon en la ĉeĥa Strážnice kun la temo "Karolo Piĉ kaj liaj mondoj". La temon jam aprobis ankaŭ la vidvino post K. Piĉ, s-ino Onesorková, plezurigita, ke la verkaro de ŝia edzo ne restas forgesita. Tiu ĉi ĉeĥa verkisto kaj akademiano (1920-1995) vekis samtempe grandan entuziasmon kaj indignon per siaj verkoj (*Litomiŝla tombejo*, *Bermuda triangulo*, *La Morisonoriloj de Chamblay*, multaj poemoj kaj artikoloj), en kiuj li aplikis amason da neologismoj kaj iom da erotiko. Sekvis abundaj polemikoj, aprobaj kaj opoziciaj, tamen ne eblas nei, ke lia verkaro apartenas al la plej grava, kiu estis verkita en la internacia lingvo.

mm

Jubileoj julio-septembro

90

František Kolařa, Františkovy Lázně
Kurisu Kei, Tokio, Japanujo
Ludmila Pařízková, Prostějov
Alena Růžičková-Pavlinová, Brno
85

Roman Michna, Lichnov
Marie Turková, Plzeň-Nová Hospoda

80

František Arnošt, Prostějov
Ladislav Bala, Mor. Budějovice
Vladimír Kovařík, Věrovanz
Vlasta Mádleová, Praha 6-Dejvice
Karel Maurenz, Karlovy Vary
Zora Prášilová, Ostrava
Zdeněk Řezáč, Velké Hamry

75

Bohuslav Dvořák, Pardubice
Karel Franc, Pardubice
Milada Hemerková, Pardubice
MUDr. Jaromír Riedl, Hradec Králové
JUDr. Miroslav Svoboda, Olomouc

70

MUDr. Václav Čížek, Vejprty
Stanislav Franc, Pardubice
Ludmila Chvořilová, Pardubice
Marta Křenková, Žichovice
Jaroslava Kůrová, Příbram
Oldřich Prokeš, Ostrava-Poruba
Milan Štáva, Prostějov
Libuše Trojanová, Brno

60

Josef Sojka, Praha 4-Lhotka

50

František Benák, Tábor
Ivana Drbohlavová, Turnov
Jindřiška Dubinová, Nymburk
Eva Jaklovská, Praha 7
Jarmila Junová, Polička
František Szappancsik, Velké Svatoňovice

Alena Růžičková-Pavlinová

Ni sendas specialan gratulon al honora membrino de ĈEA, multjara aktorino de la teatro Fratoj Mrštík en Brno, ofte prezentanta sian arton dum klubaj kulturaj programoj, kiu ĝisvivas sian belan jubileon.

Ni kondolencas

- La 11.6.2000 forpasis s-ino **Marie Bašková** (77 j.) el Lysá n. L.

- En Police nad Metují forlasis niajn vicojn s-ino **Vlasta Viktorová**, EK Náchod, en Kropáčova Vrutice s-ino **Vojtěna Bartošová** (EK Mnichovo Hradiště), en Třebíč **Bohumil Vrzák** (EK Třebíč)

- La 26-an de julio 2000 forpasis en sia 70-a jaro **František Molík** el Náchod



Ĉantoryja jubileas

Ĉantoryja estas monto en silezia Beskydy-montaro (923 m). Sur ĝia klinita supro kondukas ĉeĥa-pola ŝtatlimo. Sur la supro staras turisma rifuĝejo. Jam de la jaro 1925 tie okazas ĉeĥaj-polaj renkontiĝoj. 18.6.2000 je 75-jara datreveno kolektiĝis tie preskaŭ 100 partoprenantoj. Inter ĉeĥoj kaj poloj estis unuopuloj el Usono, Finnlando kaj geedza paro el Litovujo. Antaŭ la 12-a horo festparolis Ing. Stanislav Mandrak, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio el Gliwice. En sia parolo li tuŝis la tutan historion de tiuj renkontiĝoj, kiuj servis al plifirmigo de ĉeĥa-pola kunlaboro. Vladimír Sládeček verkis por tiu okazo himnon, kiun ni helpe de disdonitaj tekstoj kaj magnetofono kuraĝe ekkantis. Poste ni rememoris forpasintan prof. Sezurek el Cieszyn per deklamo de lia poemo.

D. Kočvara rememoris je postmilitaj renkontiĝoj, kiuj estis bremsitaj kaj eĉ malpermesitaj de tiama registaro. Kelkaj esperantistoj estis punitaj kaj eĉ enkarcerigitaj nur pro tio, ke ili sopiris pri internacia kontakto kaj sekrete renkontiĝis.

Nunjare partoprenis du polaj ĵurnalistoj por dokumenti nian festenan atmosferon. Ni diskutis pri ebleco iamaniere signi tiun lokon, kie esperantistoj tiom persiste, nur kun paŭzo dum mondmilito, renkontiĝadis. Proponoj estis pendigi tie memortabulon aŭ planti arbon aŭ

engravuri surskribon en proksiman rokon. Post komuna fotografado ni marŝis al pola flanko, ĉar tie troviĝas seĝa telfero, per kiu eblas oportune malsupreniri. Krome ĉe supra stacio estis nove konstruita ĵobogano kaj multaj el ni elprovis ĝin.

Ni interkonsentis, ke venontjara renkontiĝo okazos dum tria dimanĉo en junio. Do ni sincere bonvenigos vin je la 76-a renkontiĝo de esperantistoj sur la pinto de Ĉantoryja 2001.

Drahomír Kočvara

Hulvácká 18

700 30 Ostrava-Poruba



PAROLIGA KURSO

Pedagogická sekce ČES pořádá ve dnech 1.-3. 12. 2000 v Dobřichovicích u Prahy "Paroliga kurso". Výuka, ubytování i stravování - vše v jednom místě - pension Sokol. Dobřichovice jsou 20 km od Prahy, z nádraží Praha-Smíchov asi 20 minut vlakem.

Konverzace pro začátečníky i pokročilé.

Ubytování ve 2-4-lůžk. pokojích s vlastní sprchou a WC. Cena za 1 noc - 210 Kč.

Plná penze - 135 Kč na den. Možnost stravování pouze při více než 10 zájemcích.

V sobotu zábavný mikulášský večer.

Lze objednat i saunu - 60 Kč/1.5hod.

Přihlášky a platby do 10. listopadu.

Účastnický poplatek 100 Kč.

Způsob úhrady:

- přímo na účet ČES

č. 3330-021/0100, var. symbol 50400

- složenkou (pošleme na vyžádání)

NEVÁHEJTE A PŘIHLASTE SE!

Sejdeme se 1. 12. ve 14 hodin.

Přihlášky a dotazy pošlejte na adresu:

Jana Melichárková,

696 02 Ratíškovice 938

mmelicharek@iol.cz

SEMINÁŘ PRO UČITELE

současně s Paroliga kurso proběhne i učitelský seminář pro ty, kteří už učí, stejně jako pro učitele budoucí, kteří se na výuku esperanta teprve připravují. Prodiskutujeme metody výuky, stejně jako příručky a pomůcky.

Přihláška na "Paroliga kurso"

a seminář učitelů

Dobřichovice, 1.-3. prosince 2000.

Přihlašuji se na (označte křížkem):

Paroliga kurso

Seminář učitelů

Příjmení:

Jméno:

Adresa:

Rodné číslo:

Číslo OP (pro ubytování)

Účastnický poplatek: 100 Kč

Objednávám:

Ubytování: 2x nocleh 420 Kč
ano - ne

Strava: 2x plná penze 270 Kč
ano - ne

Celkem k úhradě: _____Kč

Datum:

Podpis:

David Sláva

Provu solvi

Trovu vorton, kiu NE apartenas al la ceteraj:

- 1) a. baloto, b. brasiko, c. spinaco, d. karoto, e. kukumo
- 2) a. kokino, b. anso, c. anaso, d. ansero, e. meleagro
- 3) a. hobojo, b. klarneto, c. glavo, d.



trumpeto, e. saksofono

- 4) a. tranĉilo, b. forko, c. kulo, d. telero, e. potoj
- 5) a. biero, b. lakto, c. soifo, d. limonado, e. suko

Kelkaj frazeologiaj esprimoj

gardi sian langon *dávat si pozor na jazyk*
baro por la fano *čára přes rozpočet*
esti teruro de la tuta ĉirkaŭaĵo *být postrachem celého okolí*

saĝan vorton li ne observas *nedá si poradit*

mallume kiel en poŝo *tma jako v ranží*
tio transiras ĉiujn limojn *to překračuje všechny meze*

pufigita raporto *nafouklá zpráva*
esti ploronta *mít na pláč krajíčku*
okazo kreas ŝteliston *příležitost dělá zloděje*
kaptis nin pluvego *překvapil nás liják*

tio komfliktas kun la komuna saĝo *to se přičí zdravému rozumu*

Josef Cink (3)

Lingvaj ludoj kaj enigmoj

Solvitaj anguletoj el la antaŭa numero (Starto 2/2000, p.)

3. fratino, rapide, apero, tiri, ido, ne o.
4. facile, aperi, cedi, iri, li, e.

Plua enskriba enigmo havas nomon **KVADRATO**

La nomo indikas la formon de la enskriba kampo. Same kiel ĉe la anguleto validas ĉe ĝi la regulo, ke la vorto en horizontala linio estas identa kun tiu de la vertikala. Ĉe la enskribataj vortoj oni povas forŝovi (elizii) la finaĵojn -o ĉe substantivoj (same kiel en poemoj kaj kantoj). Jen:

....	lava materialo	SAPO
....	gren'	AVEN
....	seniĝ' de io aŭ iu	PERD
....	akvosulko	ONDO

□□□□	malgranda vest'
□□□□	oka parto de tuto
□□□□	traiga il'
□□□□	veno internen
□□□□	teksaĵoj

Solvo: robet', okono, boril', eniro, toloj

Jen du kvadratoj por diveni:

5.

.....	tuba voj'
.....	strige krii
.....	senvesta hom'
.....	plene konsumi
.....	bulba floro

Euroscola en Esperanto

La celo de tiu projekto estas partoprenigi liceanojn el tuta Eŭropo al unutaga vizito de Eŭropa Parlamento, uzante Esperanton.

Jam de multaj jaroj Eŭropa Parlamento (EP) invitas plurfoje jare lernejojn el tuta Eŭropo (Eŭrolandoj kaj kandidataj landoj) al unutaga vizito de la parlamento.

Tiuj tagoj nomiĝas Euroscola-tagoj. Ili kutime kunigas ĉirkaŭ 30 lernejanon po proksimume 30 ĉiulande, sed ekzemple dum la eŭropa tago 2000 ili estis 500. La aĝo de la junuloj kutime estas 17/18 jaroj, sed ankaŭ jam okazis, ke partoprenis pli junaj (14/15).

Surloke, ili partoprenas en diskuto, laboro pri eŭropa civitaneco, provo de la ludo "EuroGame". Kompreneble, ili grupiĝas laŭ lingva kapableco. El ĉiu klaso, unu reprezentanto venas prezenti laboron faritan dum la tago kaj antaŭe. Parto de la kostoj estas pagataj de la Eŭropaj instancoj: vojaĝo, tagmanĝo...

Gilbert Stambach el Strasburgo renkontis funkciulon de EP, kiu informis lin pri ebleco okazigi unu tagon de Euroscola kun Esperanto kiel laborlingvo. Tio povus okazi ekzemple la 9an de majo 2001, okaze de la tago de Eŭropo.

Atentu tamen, ke tio estas nur propono de homo al homo kaj neniel oficiala decido de EP. Neniam EP estis iel favora al Esperanto, kaj ties prezidantino Nicole Fontaine iam respondis negative al kuriero el E-movado. Kompreneble estas ankaŭ dubinde, ke EP tiel donacu la daton de la 9a de majo al E-movado.

- La avantaĝoj de tio estus multaj:
- konatigi efikecon de Eo al Eŭropaj instancoj;
 - instrui E-on al 300 junuloj en Eŭropo.

Kompreneble, se ni tion sukcesos, ĝi povas doni tre bonan bildon de E-movado al Eŭropaj Instancoj. Sed ankaŭ malo eblas: se ni ĝin fuŝos, la rezulto povas esti katastrofa.

Kiel sukcesigi tion? Konkrete, tio signifas, ke ĉiuj partoprenantaj lernejoj devos scipovi Esperanton, kiam ili atingos Strasburgon.

Nia tasko kiel E-movado konsistas do en trovi ekzemple po 30 junulojn (en unu aŭ du klasoj) en 10 landoj de Eŭropo, kaj instrui al ili Esperanton ĝis sufiĉa nivelo, por ke ili povu vere komuniki pere de ĝi en majo 2001.

Povas instrui al ili E-on ĉu unu el iliaj instruistoj, ĉu esperantisto el proksima grupo.

Fine, ne nepre endas, ke ĉiuj lernejanon flue parolu Esperanton. Jam sukcesa estas, se en ĉiuj klasoj, almenaŭ du aŭ tri kapablas facile interkomuniki esperante.

Vi ja komprenis: ni serĉas kandidatajn klasojn en tuta Eŭropo. Se vi instruas E-on en tuaĝa klaso (inter 15 kaj 18) aŭ konas liceon, kiu povus konsenti pri E-instruado dum tuta jaro, cele viziton al la EP, nepre kandidatu kaj rapide. La infanoj devas esti preparitaj ĝis majo.

*Philippe Bérizzi, 17 allée Jean-Baptiste Clément, 78570 Andrésy, Francio
pberizzi@esperanto.org*

NE FORGESU!

Ĉeĥa-Saksa Tago

9.12.2000 en Ústí nad Labem

ESPERANTISTA PARTOPRENO EN TERMINOLOGIA SOMERAKADEMIO

Delongaj kontaktoj de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) kun la internaciaj terminologiaj instancoj Info-term kaj TermNet ebligis la partoprenon de du junaj geesperantistoj, Fabien van Mock kaj Sandra Schweder, en la Terminologia Somera Akademio en Vieno de la 7-a ĝis la 12-a de aŭgusto, kun entute 35 partoprenantoj el 20 landoj. La unusemajna aranĝo konsistis el kvin partoj: 1) bazaj principoj de terminologio; 2) terminologia mastrumado per komputiloj; 3) trejnado kaj instruado pri terminologio; 4) apliko de terminologio en tradukado kaj adaptado de komputilaj programoj kaj dokumentoj; 5) ontologio.

KVAR NOVAJ HONORAJ MEMBROJ EN UEA

En sia kunsido en Tel-Avivo la Komitato de UEA distingis kvar aktivajn esperantistojn per honora membreco de la Asocio: **Juan Bachrich** (1921, Venezuelo) estas jam de kvin jardekoj la motoro de la movado en sia lando kaj longtempe peranto de UEA. **Elvira Fontes** (1916, Brazilo) ricevis la honorigon pro siaj meritoj kiel Esperanto-instruistino. **Edwin De Kock** (1930, Sud-Afriko/Usono) certigis sian lokon kiel

unu el la plej elstaraj poetoj de nia lingvo jam per sia debuta kolekto en 1961. **Sija van Wijngaarden** (1920, Nederlando) laboris kiel oficistino en la Centra Oficejo de UEA tri jardekojn ĝis sia emeritiĝo en 1985.

PREMIO DEGUĈI AL ROB MOERBEEK

En la Fermo de la Tel-Aviva UK okazis por la 14-a fojo la transdono de unu el la plej prestiĝaj premioj de la Esperanto-movado, Premio Onisaburo Deguĉi de UEA. La premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. En 2000 la Estraro de UEA aljuĝis la Premion Deguĉi al s-ro Rob Moerbeek el Nederlando pro lia longtempa agado helpe al triamondaj esperantistoj kaj por handicapitoj, precipe blinduloj. Dum multaj jaroj li faris tion kune kun sia edzino Nora, forpasinta en 1998, konata aktivulo de la blindula Esperantomovado.

SUBVENCIO CIGNO AL INDIĜENAJ DIALOGOJ

Ekde 1994 la Estraro de UEA asignas Subvencion Cigno al projekto, kiu kontribuas al disvastiĝo de Esperanto en la Tria Mondo. La subvencion financas la japana esperantisto Etsuo Miyoshi kaj ĝi valoras 500 000 japanajn enojn (ĉ. EUR 4900). La ĉi-jaran subvencion ricevis la projekto Indiĝenaj Dialogoj, lanĉita antaŭ du jaroj kun la celo krei komunikan reton inter organizaĵoj de indiĝenaj popoloj per la uzo de interreto kaj Esperanto.

KALENDARO 2000

aprilo-decembro Výstava Esperantem k mezinárodnímu dorozumění ve Státním okresním archivu Znojmo, Divišovo nám. 5, návštěvní dny: pondělí a středa.

1.-3.9. Jarkonferenco de la ĉeĥa IFEF-sekcio

16.9. E-Tago Pardubice

29.9.-1.10. Internacia Kultura Festivalo Ústí nL

30.9. Lanškroun-Králíky renkonto de EK-oj

13.-15.10. Konferenco de ĈEA en Znojmo

22.-29.10. Lingva seminario Skokovy

novembro Polička

10-13.11. Kolokvo pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, temo: ekonomio. Kava-Peĥ, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

1.-3.12. Paroliga Kurso kaj Instruista Seminario kun Nikolaa Vespero en Dobřichovice

9.12. 17a Ĉeĥa-Saksa tago en Ústí nL

9.12. Rememoro pri Zamenhof, Písek

13.12. Beseda o Zamenhofovi, EK Píerov

16.12. Zamenhof-festo Vieno - ekskurso IFEF

31.12. (?) Esperanto-Silvestro - Česká Třebová

2001

21.5. Cent jaroj de EK Brno

14.-20.7. OSIEK Strážnice

Jak platit svazu

Variabilní symboly pro platby ĈES

311YYXX úhrada expedice Libroserva (YYXX doplněno vedoucím Libroserva)

6043 předplatné Starto bez členství v ĈES

0668 dary svazu

6940 členské příspěvky ĈES

6941 členské příspěvky UEA

50100 sekce mládeže

50200 sekce šachistů

50400 sekce pedagogická (včetně ILEI-IPR)

60xxx subkonta klubů (koncové číslo pro každý klub odlišné)

80200 ediční fond

80300 propagace E-a v regionálním tisku

80400 fond Tilio

80500 ediční fond Anny Milatové

10007 7. konference ĈES Znojmo, 2000

80500 Ediční fond Anny Milatové

Variabilní symbol je nezbytný pro správné určení a zaúčtování platby. Při jeho vpisování do příslušné rubriky poštovní poukázky doplňte zprava nulami. Pro vypisování poštovních poukázek typu A-V používejte psací stroj nebo černou propisovací tužku (event. černý tenký popisovač). Poukázku čitelně vyplňte v obou dílech, nezapomeňte na rubriku odesílatel. Na těchto poukázkách byla zrušena *Zpráva pro příjemce*, nelze tedy vpisovat žádná sdělení.

Platby s použitím příslušného variabilního symbolu můžete též provést složením hotovosti v kterékoli pobočce Komerční banky a.s. na svazový účet č. 3330-021/0100, konst. symbol 0379. Vždy uveďte v příslušné rubrice jméno složitela - tedy jméno svoje, případně osoby, jejímž jménem platbu provádíte. Jednotlivci uveďte příjmení a místo bydliště (NOVÁK PŘEROV), kluby zkratku "EK" a sídlo (EK PŘEROV). Zásadně prosím **nevypisujte celý název**, např. Klub esperantistů, místní pobočka ..., na výpisu se nám pak objeví omezený počet znaků - *Klub esperantist*, při cca 50 klubech v ČR je pak obtížné a často nemožné zjistit odesílatele.

Pro platby bankou ze svého účtu na účet svazu postupujte obvyklým způsobem.

JAZYKOVÁ PORADNA

Na internetové stránce Starta jsme otevřeli jazykovou poradnu pro české esperantisty: www.clavis.cz/starto.

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
Internet: cea @ tnet. cz
www.kuk.cz/cea/
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (31. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Členská evidence a změny adres: Květa Krajičková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (31-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1